






Queenstown, Nov-Zelando



# Esperanto sub la Suda Kruco

Novembro-Decembero 2002  
Numero 60 (vol. 10, no. 6)



ISSN 1039-9380

# *Esperanto sub la Suda Kruco*

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj  
Numero 60 (volumo 10, numero 6), Novembro-Decembero 2002

Redaktoro: Donald Broadribb  
PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org)

## **Libroservo**

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo,  
143 Lawson St, Redfern, NSW 2016,  
Aŭstralio. E-poŝte:

[libroservo@ans.com.au](mailto:libroservo@ans.com.au)

## **Korespondaj kursoj**

Hazel Green, 44 Towoomba Road,  
Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte:

[hazgreen@twmba.net](mailto:hazgreen@twmba.net)

## **SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO,**

### **VERKU ARTIKOLON!**

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi el-  
kovertigis vian novan ekzempleron de  
*Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere  
bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun  
amatan eseon, ideon, rakonton, esprim-  
mon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon,  
foton. Ni preferas ke vi sendu vian kon-  
tribuon per e-poŝto, al la adreso [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org); vi povas ankaŭ  
sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ  
250mb), sur komputila disko (Mac aŭ  
Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi  
sendas sur papero, la teksto devas esti  
klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu  
sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ek-  
stra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn  
manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti  
kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de  
ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo.  
Laŭbezone teksto povas esti mallong-  
igita. Pri la enhavo de artikolo respon-  
decas nur ĝia aŭtoro.

## **La kovrilbildo:**

Queenstown en Nov-Zelando, unu el la plej  
vizitindaj pejzaĝoj.

## **EN ĈI TIU NUMERO**

### **Artikoloj:**

Miraklon post miraklo en Edz- perantujo (Paul Desailly) .....	4
Promeno al bieneto (J. R. Tenório) ....	6
Sportheroo: Dick Reynolds (Stephen Pitney) .....	7
AEA, ni rigardu antaŭen (Jennifer Bishop) .....	8
Por Macintosh/Windows-uzantoj .....	9
Adiaŭ Ruth (Franciska Toubale) .....	10
Propraj nomoj en Esperanto (Marcel Leereveld) .....	11
Alvoko (Marcel Leereveld) .....	12
Ni bonvenigas .....	12
Skibas la legantoj: Donald Rogers ...	13
Komentoj (D. Broadribb) .....	17
Postkongresa vojaĝo tra Nov- Zelando (Tereza Kapista) .....	22
Renkontiĝo de Esperantistaj familioj Bart Demeyere .....	24
El la regionoj .....	26
Odlo Bokserp .....	28

### **Recenzo:**

*La nova PIV* (rec. D. Broadribb) .....

### **For the Beginner: p.19**

**Lastmomenta sciigo: mortis Ralph  
Harry kaj Brian Currie. (Vidu p. 27.)**

*ESK* estas legebla per Interreto:  
<http://www.esperanto.org.au/esk>

Limdato por artikoloj por la januara  
numero: 15 decembro.



## Recenzas via Redaktoro



*La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto*. Ĉefredaktoro: Michel Duc-Goninaz. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda, 2002. 1265 paĝoj, bindita.

Takso: 🍷🍷🍷🍷

Post multaj jaroj da atendado, ni fine havas la novan eldonon de *PIV*, kies unua eldono aperis jam en 1970. Nu, la atendado estis longa, la anticipoj estis grandaj, kaj la nova eldonaĵo estas plene impona. La tuto estas tute reviziita, la difinoj reverkitaj (aŭ almenaŭ zorge reviziitaj), multaj eraroj malaperis — ne tre multaj anstataŭis ilin! La prezo — preskaŭ \$150 aŭstraliaj dolaroj inkl. poŝtkoston — estas egale granda kiel la libro mem, do ne multaj el ni povos meti ĝin sur niajn librobretajn, sed espereble almenaŭ la kluboj akiros ĝin por ĝenerala uzado fare de siaj membroj.

Kompreneble kelkaj mankoj ekzistas. La redaktoroj simple kopiis el la unua eldono de *PIV* la indikon pri oficialeco de la radikoj (ĉar, kedu aŭ ne!, la Akademio mem ne posedas kompletan kolekton de siaj *Oficialaj Aldonoj*!!<sup>1</sup>), tiel ke pluraj eraraj indikoj en tiu unua eldono ankaŭ kopiigis.<sup>2</sup> Kaj pro la eksterordinara

komplekseco de la entrepreno revizii la tutan libregon, kelkaj nekonsekvencaĵoj restas (ekz. oni trovas informon pri la uzado de “radio” kun la senco telekomunika, ĉe la kapvorto “radiofono”, sed neniu mencio sub la kapvorto “radio” mem; kaj por trovi la signifon de la stranga idiotismo esperanta “terpomo” oni devas serĉi sub la cefvorto “pomo”! — Tamen, kutime *Nova PIV* listigas tiajn problemsignifajn kombinaĵvortojn laŭalfabete aranĝitaj enkadre de la tuta vortaro). Tiaj mankoj estas mirige malmultaj.

La difinoj estas ĝisdatigitaj, kaj zorge korektitaj. Mankas nun multaj el la personaj ideologiaĵoj de la ĉefredaktoro de la unua eldono, Gaston Waringhien, ilin anstataŭas pli objektivaj difinoj. Kaj kie Waringhien pro propraj emoj misinformis pri diversaj vortoj en la *Fundamento*, *Nova PIV* ĝustigis la aludojn kaj reproduktis la veron. Ekzemple, *Anno*, *Mario*, *Margareto*, kaj multaj aliaj, en la *Fundamento* estas virinnoj, fakto kiun oni tute ne trovas en la unua eldono de *PIV*.

La ilustraĵoj nun troviĝas en siaj ĝustaj lokoj en la kadro de la vortaro mem, anstataŭ kunigite en malfacile uzebla aparta paĝaro kiel en la unua *PIV*. Laŭdire enestas ankaŭ multe pli da ilustraĵoj. Sed mi devas konfesi ke ili ankoraŭ ne kontentigas min. Ili restas nur desegnaĵoj, eĉ kie fotoj estus multe pli informaj kaj nemiskomprenigaj (kaj fotojn aperigi ne kostas pli ol desegnaĵojn aperigi, laŭ la presmetodo uzita). Tamen...gustoj varias, kaj evidente la kompilintoj ne akordas kun

1. Efektive, la Akademio nuntempe penas refari aŭtentan liston de la enhavo de tiuj *Aldonoj*, kaj fari oficialan difinaron. La listo estas ankoraŭ tre nekompleta, sed oni povas trovi la ĝisnunajn rezultojn per Interreto ĉe <http://www.akademio-de-esperanto.org>.

2. Atenta ekzameno de la *Fundamento de Esperanto* uzanta perkomputilan indeksadon de ĝiaj vortoj montris al mi plurajn erarojn. Kiu deziras legi mian tutan esploron tiuteman, povas ricevi ĝin de mi kiel e-poŝtan aldonajn. — (D)

mi pri tio.

Ensume, *Nova PIV* estas multe pli objektiva leksikono ol sia antaŭinto,

pli facile uzebla, pli facile legebla, pli fidinda, kaj por serioza uzanto de Esperanto utiliga. □

## Miraklon post miraklo en Edzperantujo

de Paul Desailly  
2 septembro 2002

Antaŭ precize du monatoj en Xiangtan, la naskiĝloko de Mao-Tse-Tung, apud Changsha kiu estas la ĉefurbo de provinco Hunan, Chen Velanta Desailly kaj mi geedziĝis. La supre aludita miraklo kuŝas en tio ke bela poligloto juna ankoraŭ amas tiun ĉi malbelan kaj maljunan filistron el Aŭstralio.

Eble mi eraras sed antaŭe ŝajnis al mi ĉiam ke instruisto ne rajtas amrilati, eĉ per bonaj intencoj kaj bonkonduado, al sia studentino, pro kvaŝaŭa malfido je ŝiaj gepatroj foraj aŭ pro morale subkomprenata sed ne skribita klaŭzo de mia kontrakto. Kiel ajn tio estus, la vero kaj la realo kutime pli komplikiĝas, ĉu ne?

Tutsimple, kaj super ĉiuj eventualaj plendoj, mia edzino kaj mi tre amas unu la alian. Niakaze, la intrigo pli kaj pli iĝas spirala vojo ĉar mia amatino, Velanta, jam estis elfalinta el nia kolegio, Pekina Nacia Universitato, antaŭ ol ni ekamiĝis dum privataj Esperantolecionoj.

Sendube ŝi estas la plej talenta studento de lingvoj, ĉu ina ĉu vira, por diri nenion pri ŝia svelteco, kiun mi trafis iam ajn.

Plaĉas nek al ŝi nek al mi la konkurenca etoso de nia eduka sistemo. Ŝi, kiel plenaĝulo, sendepende elektis forlasi tiun ĉi universitaton antaŭ ol ŝi ricevis aŭ akceptis mian proponon de geedziĝo. Tute sufiĉas por ŝi kaj mi,



Velanta kaj Paul Desailly

kiel gebahaanoj, havigi permeson geedziĝi de sole nur niaj gepatroj; ni do ne celas aprobon de aliaj.

Sed tamen mi volas klarigi ĉion ĉar mi rekomendas ke ŝi gajnu premion por senpage kongresi en la 19a Somera Kursaro de Esperanto okazonta post kvar monatoj en mirinda Melbourne, ŝi meritas vian konsideradon ne pro tio ke ŝi estas mia edzino, sed pro tio, kiel tute flua parolanto de la angla kaj pluraj ĉinaj lingvoj, ke ŝi diligente kaj sukcese studadas Esperanton, alte taksas la Internan Ideon kaj porpacajn idealojn de la zamenhofa lingvo, kaj aprezas jam, post diverspecaj travivaĵoj inter aziaj gesamideanoj partoprenintaj la 3an Azian Kongreson en Seulo, nerefuteblan valoron de la Internacia Lingvo por antaŭenigi lingvajn homajn rajtojn.

Ŝi estos bona ambasadorino por okcidentanoj kaj orientanoj laŭlonge de la vojo de efektivigado de universala helpa lingvo.

Krome, mi volas diri ke mi mem estas preta dum la Aŭstralia Somer-Kursaro repetitori<sup>1</sup> por senpage helpi komencantojn koncerne prononcon ktp.

En la dua semestro 2001-2002 mi instruis la anglan en fame konata ĉina universitato, Beijing Administration College, nuntempe famigita ĉar ĉiuj lernantoj estas plenkreskaj anoj de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj pro tio ke en pasintaj jarcentoj Matteo Ricci (1552-1610), jezuita erudiciulo kaj sciencisto, prelegis tie.

Pro bona nivelo de parolata angla, flanke de miaj gestudentoj, ni ofte diskutis delikatajn kaj politikajn temojn. Ekzemple, memorante ke Ĉinio kaj Sovet-Unio ekde 1945 rolas kiel gravuloj kun rajto de vetoo ĉe Unuiĝintaj Nacioj, ni maturmaniere debatis la ĉefajn fontojn de la eŭropdevenaj pensmanieroj kaj etiko rilate la filozofiojn de antikva Grekio kaj la profetojn de la Malnova kaj Nova Testamentoj, samkiel ni en konversacia rondo interesiĝis pri la UN-mandato militi en Koreo antaŭ duonjarcento.

Nesciinte la ĝustan respondon koncerne la lastan punkton, mi skribis al Voice of Russia World Service. La kvaran de aŭgusto okaze de mia 50-jariĝo, plus unu tago, dato koincide kongruanta kun la inaŭguro de la 87a UK en Fortalezo, Joe Adamov, kiu estas VOR-anoncisto, mallongonde provizis respondon, klarigante ke la enketinto instruas la anglan kaj Esperanton ĉe Beijing National University.

Pro vizaj problemoj proksimume 100 aliĝintoj ne partoprenis la 3an Azian Kongreson. La Kongreso en Seulo estis relative sukcesa, kun 409

partoprenantoj el 16 landoj — Aŭstralio, Britio, Ĉinio, Germanio, Hindio, Irano, Japanio, Latvio, Nepalo, Pakistano, Rusio, Svedio, Usono, Uzbekio, Vjetnamo, kaj Koreo. La estro de Ĉina Esperanto-Ligo kaj *El popola Ĉinio*, sinjoro Yu Tao, sukcese mociis ke oni registru Tajvanon kiel provincon de Ĉinio. Irano kaj Nepalo konkuris inter si por okazigi la 4an AK-on; Katmandu sukcesis — 2005. Ŝajnas ke Aziaj Kongresoj finance sukcesas, ĉar debato leviĝis pri ĉu en ĉiu jaro havi Azian Kongreson. Oni prokrastis tiun decidon por ne karamboli kun la UK-2004 en Pekino. La azia movado de Esperanto ĝuas bonan reputacion por mondnivelaj Esperanto-eventoj: 1965 UK — Tokio; 1987 UK — Pekino; 1994 UK — Seulo<sup>2</sup>. Laŭ nombro da kongresanoj, ŝajnas ke po 15% la unuaj du aziaj kongresoj pli fortaj estis, sed tamen aliflanke, en nia bahaa fakkunsido seula proksimume 30 homoj partoprenis, inkluzive de du profesoroj (respektive el Germanio kaj Japanio). La germano estas estro de AIS, profesoro Helmar Frank.

Retadreso de Paul Desailly:  
<[pdesailly@hotmail.com](mailto:pdesailly@hotmail.com)> □

2. Mondnivelaj kongresoj en kiuj mi mem partoprenis.



**POR RIDIGI  
VIN**



Dum la geografia leciono, la instruistino demandas:

“Joĉjo, donu al mi tri asertojn kiuj pravas ke la tero estas ronda”.

Post cerbumi iomete, li respondas: “Bone, la libro diras ke ĝi estas, mia patro diras ke ĝi estas, kaj nun sinjorino, ankaŭ vi diras ke ĝi estas, do...

[El *Eventoj*]

1. “To tutor”.

## Promeno al bieneto

de José Roberto Tenório

Ordinare esperantistoj renkontiĝas en kluboj, plej ofte por paroli pri Esperanto aŭ klubaj aferoj. Plej malofte esperantisto invitas alian esperantiston por viziti parkon, kinejon, lunĉejon k.s. por babili esperante pri ĉiutagaĵoj. Esperantistoj estas forte interligitaj ideale, sed supraĵe kunligitaj sociale. Tial oni devas laŭdi ĉiajn iniciatojn kiuj sociale pli alproksimigas la esperantistojn. Ĉifoje la laŭdoj iras al S-ino Aparecida Araújo, kiu disponigis sian bieneton, situantan ĉirkaŭ 25 km for de la urbo San-Paŭlo, al dudeko da gesperantistoj. La karavano, konsistanta el kvin aŭtoj, ekiris de kvartalo Santana la pasintan 30an de majo matene kaj atingis la bieneton post duonhora veturado.

Por kelkij la promeno ja komenciĝis aventurece. Unu el la stiristoj, promisatento, sekvis aŭton ne apartenantan al la karavano kaj atingis la renkontiĝejon ĝuste tagmanĝohore! Alia survoja aventureto okazis proksime de la renkontiĝejo. La ŝoseo, komence ĉirkaŭita ambaŭflanke de urbaj konstruaĵoj, post kelkaj kilometroj subite iĝis vojo bele ornamita de arboj, kies interplektitaj branĉoj formis arkon super ĝi. La aŭto antaŭ la nia, atinginte tiun plej deklivan parton de la vojo,

komencis fumi kiel drako kaj iom post iom kaŝis ĉiujn aŭtojn malantaŭ si sub blanka nubo da fumo, kiu krekis pli kaj pli. Oni havis la impreson ke la tuta ĉirkaŭa arbaro ekbrulas. Plej malbone, la vojo ne havis ŝoserandon. Fine la timigita stiristo sukcesis parkumi la aŭton kaj pruvis al ni per fakturo ke la aŭtoriparisto estis riparinta la aŭton la pasintan tagon. Antaŭ tiu konstato ni ĉiuj malstreĉiĝe spiris.

Alveninte al la bieneto, ni konstatis ke tie jam atendas nin nia kara gastigantino kaj ŝiaj amikemaj familianoj, kiuj, malgraŭ tio ke ili ne parolas la lingvon de la vizitantoj, faris sian eblon por kontentigi ĉi tiujn per preparado de bongusta supo el manioko, frandinda suko el sukerkano, kaj ĵusmuelita kafo i.a., ĉiuj plantitaj kaj rikoltitaj en la bieneto mem.

La antaŭkorto de la bieneta domo estas kovrita de verda herbotapiŝo bone zorgata. Sur ĝi estis aranĝitaj kelkaj tabloj kun seĝoj por ke la vizitantoj, komforte sidantaj, plenigu la ĉirkaŭaĵon per la belsona lingvo de l' homaro. Klaĉadoj, informoj, sugestoj, patraj avertoj, kiel-nomiĝas-tioj, ridoj, demandoj, rimarkoj, kantoj kaj alioj tutesperante kaj plengue trafuis en la aero de unu buŝo al alia.



Tien oni iris ne por pridiskuti la protokolon de la lasta klubkunveno, nek por elpensi plian strategion por varbado de novaj samideanoj. Male, tien ni ĉiuj iris kun pli scienca celo. Ni volis scii kiu estas la esperanta res-pondo por piko de formiko; kiel reagas esperante patro kies kvarjara filino (inter ni ja troviĝis denaska esperant-istino) kaŝe surgrimpas arbon ĝis alteco de dek metroj kaj krias “paĉjo, jen mi sukcesis!”; kiaj vortoj (fundament-aj, akademaj, PIV-aj) plej taŭgas por priskribi kamparan pejzaĝon. Nur por citi kelkajn eksperimentojn.

Bedaŭrinde aperis nenia formiko, la etulino forgesis ludi arbo-surgrimp-adon, kaj la feriantoj estis tiel ravitaj pri la pejzaĝo ke mankis al ili vortoj por sin esprimi...

Nu, eble en la venonta promenado ni estos pli bonŝancaj.

[Represita kun permeso, el *La Lampiro* (Brazilo) aŭgusto-novembro 2002.]

## Sportheroo de Stephen Pitney



Riĉjo Reynolds

La 6an de septembro ni adiaŭis unu el niaj plej famaj sportistoj, Riĉjo Reynolds, kiu aĝis 87 jarojn.

Samtempe kiel Don Bradman ricevis grandan aplaŭdon pro sia kriket-ludado en la 1930oj, Reynolds, konata kiel “Reĝo Rikardo”, estis la heroo de nia vintra sporto, Aŭstralia Futbalo,

de 1933 ĝis 1951. Li ludis 320 partiojn por Futbaloklubo Essendon, kaj poste trejnis la teamon dum la sekvaj 22 jaroj.

Dum sia kariero li gajnis multajn honorojn, inkluzive trifoje la Medalon Brownlow kiel la plej bona ludanto. Li estis konata pro siaj lerto, sportisteco, kaj filmstela bonaspekto.

Tributoj al li multon diris pri lia varmkoreco, modesto, humilo, kaj imitindeco por gejunuloj. Li neniam drinkis, nek fumis.

50 jarojn post sia lasta ludo li ankaŭ estis temo de tuta unua paĝo de la plej vendata ĵurnalo en la lando.

Multaj objektoj estis nomitaj memore al li, inkluzive de spektantosi- dejo ĉe Essendon, lokomotivo, kaj enirejo de la Kriket-Sportejo Melbur- na (MCG) apud la Enirejo Bradman.

Li estis vera legendo de la aŭstralia sporto, tamen, iom domaĝe, liaj talen- to kaj famo ne estis konataj ekster Aŭstraliao, ĉar la Aŭstralia Futbalo ne estas internacie ludata. □



## POR RIDIGI VIN



Nun, estante gepensiuoloj, miaj gepatroj dis- kutas sian estontecon.

“Kion vi faros, se mi mortos antaŭ ol vi?” demandis mia patro.

Longe pripensinte mia patrino diris, “mi verŝajne serĉos tri aliajn needziniĝintajn virinojn aŭ vidvinojn, iom malpli maljunajn ol mi, ĉar mi estas ankoraŭ tre aktiva, kun kiuj mi dividos la lupagon de la domo.”

Tiam mia patrino demandis mian pa- tron, “sed kion vi faros, se mi mortos antaŭ ol vi?”

Respondis mia patro, “plej verŝajne mi faros la samon.”

(Kontribuita de Brenda Linnane) [El *Tamen Plu*]

# AEA, ni rigardu antaŭen

Perspektivo de la prezidanto

Jennifer Bishop

La fino de la jaro estas bona momento por rigardi antaŭen sed ne sen retro-rigardi al la rezultoj de jam plenumitaj deĵorperiodoj. Estinte du jarojn prezidanto de AEA, helpate multe pro la ebleco utiligi oficejon ĉe Universitato Monash, mi opinias ke estas bona momento serĉi novajn kandidatojn por teni la rimenojn de nia vaste etendita komunumo. Por kuraĝigi aliajn kandidatiĝi, mi volas substreki la ĝojon kiun mi spertis laborante kun amikaj samideanoj pretaj kunlabori libervole por la asocio. Farinte peton aŭ proponon kaj helpate de la rapida e-poŝta servo, mi plej ofte trovis preskaŭ tujan pozitivan respondon sur la ekrano.

Kvankam ne ĉiam anoncitan, la estraro atingis multon, ekzemple:

1. Ni kunlaboris kun UEA por informi niajn edukajn instancojn pri UNESKO, kaj poste kontaktis alian ligitan NRO-n “International Volunteers for Peace” por reklami Esperanton en ties gazeto.
2. Ni decidis helpi ELWAN okazigi la somerkursaron en Perto 2002 per \$7500, tre sukcesa kaj farinda projekto, kaj per \$5000 al EFV por 2003 en Melburno.
3. Ni kreis AEA-rethejmpaĝon kun ligiloj al aliaj kunlaboraj asocioj.
4. Ni decidis liberigi enspezojn por kuraĝigi novajn projektojn sub la rubrikoj Informado, Instruado, kaj Eksteraj Rilatoj.
5. Ni komisiis novan adresaron.
6. Ni trovis novan “Public Officer” en Kanbero, necesajo de korporaciigo.
7. Ni subtenas la eldonadon de

traduko en la anglan de *Kanako el Kananam* der Kenneth Linton.

8. Ni komisiis Ralph Harry-n pritrakti la klarigon pri Esperanto en la nova *MacQuarie Dictionary*.

9. Ni pagis ekspozicion ĉe la Konferenco de DEET “Languages Australia”, Melburno, Okt. 2002.

10. Ni nun prilaboras proponojn por la ekstera pritraktado de la programo “Commonwealth Languages Other Than English in Schools”.

11. Laste sed ne balaste, ni certigis ke ĉiuj gravaj informoj atingas la provincajn reprezentantojn por plua surloka pritraktado.

Ni kore dankas la subtenadon de la membraro esperante ke la nova estraro sukcesos kreskigi ĝin dum venontaj jaroj. Kompreneble la estraro mem estas nur malgranda parto de la organiza teamo. Ni rekonu kun laŭdo speciale ankaŭ la konstantan laboron de Donald Broadribb, sprita, sperta kaj fidinda redaktoro de la oficiala organo, *ENK*; de Marcel Leereveld pro lia diligenta kaj ĉiam kuraĝiga prizorgado de la ekzamena komisiono; de Kep Enderby pro liaj imponaj intervjuoj kaj prelegoj por la publiko; de Hazel Green pro amika kaj detala prizorgado de la viglaj Korespondaj Kursoj; de Petro Hai pro ĝenerala prizorgado de nia nacia biblioteko en Kanbero; de ege bonkoraj Sid Wolifson kaj Margaret Bamberry daŭre baraktantaj por regi la Libroservon; de mia subteninta antaŭulo, Ron Gates, pro la ampleksa kompilado de la nemankebla adresaro; kaj laste de la diligentaj redakto-



teamoj de la gazetoj el la provincoj, ĉiuj belaspektaj, interesaj kaj legindaj. Por efike kunlabori al la celo disvastigi konon pri Esperanto, plej gravas al nia asocio ankaŭ la retligoj el ĉiu klubo al la internacia instanco UEA, kies personaron mi ne forgesu ankaŭ danki.

Pro la emeritiĝo de mia edzo, Alan, ni ambaŭ intencas pasigi pli da tempo ĉe nia familio en Anglio, ĉe interesaj konferencoj, kaj ĉe amikoj en diversaj partoj de Eŭropo. Tamen Aŭstralio dum la venontaj jaroj restos nia hejmlando, al kiu ni ĉiam ĝojplene revenos, kaj AEA nia fratema Esperanto-komunumo. Ni ambaŭ deziras al AEA kaj al nia frata asocio NZEA sukceson je kreskigado je sia membraro. Tio realiĝos eble per starigo de ofte petataj lerngrupoj, rezulte de bona tutlanda informadkampanjo de disdonado en granda kvanto de la planita reklamstrio: [www.esperanto.org](http://www.esperanto.org) kaj la kompaktdisko prilaborata en Nov-Zelando. Tamen por plene sukcesi, necesos ke la nova estaro efike varbu unue inter ni la grandanimajn kunlaboremulojn kiuj trovos aŭ faros la necesegan libertempo.

Kun amikaj salutoj al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA por la festa sezono, ni antaŭĝuas revidon ĉe la Ĝenerala Jarkunveno okaze de 19a Aŭstralia Kursaro de Esperanto ĉe International House, Melburno, 5-17 januaro 2003.

## Por Macintosh-uzantoj:

- *Mellel* estas plenkapabla programo, kiu kostas US\$12. Via redaktoro ofte uzas ĝin, ankaŭ por verki librojn. Ĝi unikodas, kaj estas speciale preparita por faciligi ankaŭ invers-

direktan skribadon (ekz. por la hebrea kaj araba lingvoj).

- Alia unikod-tekstprogramo estas *Blaze*, ankaŭ nemultekosta, sed multe malpli kompletkapabla.

- La retlegilo (“krozilo”) Opera 6 nun senpage haveblas. Ĝi ankaŭ bele legas unikode, kaj enhavas la eblon unikode sendi kaj ricevi e-poŝtaĵojn.

## Por Windows-uzantoj:

- *EspType* — ni plu rekomendas ĉi tiun senpagan programeton por ebligi facilan uzadon de la esperantaj literoj. Ni ricevis praktikajn demandojn pri ĝia utiligado, kies respondojn ni prezentas jene:

1. Elŝutu *EspType-n* sur vian “desktop”-on.

2. La programeto estas pakita (“zipita”). Double klaku per via muso sur ĝia ikono.

3. La programo instalos sin mem kaj metos ikoneton de krajono en la larĝan menuon ĉe la malsupro de via ekrano.

4. Dekstre-klaku sur la krajonikono por aperigi menueton en kiu vi povos elekti “configuration” — kiu informos vin pri uzado de la programeto.

5. *EspType* ebligas uzi la esperantajn literojn en preskaŭ ĉiu Windows-programo.

- Multaj komputiluzantoj ŝajne ne scias ke ekzistas multaj retlegiloj (“kroziloj”) aparte de Internet Explorer kaj Netscape. Ni rekomendas la retlegilojn Opera kaj Mozilla, ambaŭ bone unukodas (per *EspType*), senpage haveblas, kaj — grave, laŭ multaj uzantoj de komputiloj — ili ne estas posedaĵoj de la grandaj usonaj firmoj Microsoft kaj AOL.

Cetere: pro kialo de mi nekonata, nur malmultaj Windows-uzantoj utiligas unikodon. Kial? E-poŝtaĵoj kun veraj esperantaj literoj vere belas... □

## Adiaŭ Ruth

de Franciska Toubale

La lastan fojon kiam mi vizitis Ruth-on en aparta loĝejo por malsanuloj, mi komprenis ke mi ne revidos ŝin post mia dumonata restado en Eŭropo. Ekde iom da tempo ŝi ne plu povis paroli, kaj finfine ŝi eĉ ne plu klopodis rideti. Ŝi forlasis nin tuj antaŭ mia foriro.

Kiam mi unuan fojon venis Aŭstralion, Ruth estis unu el la unuaj personoj kiujn mi renkontis kiel esperantistino kaj ankaŭ kiel najbarino, kaj pro la rolo kiun Gerald ludis en la vivo de Bernie. Tiam mi estis preparanta ekzamenon por la Esperanto-Franca Instituto, do ŝi tuj donis al mi valorajn dokumentojn, kiujn mi daŭre nun uzas. Fakte pro ŝiaj atentemo kaj bonkoreco, Ruth ĉiam trovis la ajon kiu helpos vin.

La trajnvojaĝo al la ĉiusemajna esperantista kunveno estis la oportuno ekscii pri multe da novaĵoj. Al ĉiu laŭ lia/ŝia karaktero, ŝi disdonis eltondaĵojn pri diversaj temoj kun entuziasma komentario, ĉar Ruth interesiĝis pri ĉiu evento, ĉiu invento ie ajn en la mondo. Ŝi estis bone informita ne nur pro regula legado de ĵurnaloj, spektado de televidaj programoj, sed ankaŭ pro parolado kun multaj homoj ĉu najbaroj, ĉu vendistoj, ĉu membroj de la preĝejo aŭ aliaj grupoj al kiuj ŝi apartenis.

Ruth havis ankaŭ grandan fantazon kaj, ekzemple, imagis metodojn por lukti kontraŭ polucio kiujn aŭtoro de sciencfikcio ne elĵetis.

En kriza momento ŝi ne perdis tempon per vanaj paroloj, ŝi tuj metode kaj rapide organizis ion por savi la situacion. Ŝi tiel reorganizis la mar-

dan Esperanto-renkonton, kiam gvidanto malaperis. Kiam ŝi eksciis ke mono estas bezonata por la infanoj okaze de la Universala Kongreso en Adelajdo, ŝi decidis ke ĉiun semajnon ĉiu membro de la klubo pagu unu aŭ du dolarojn, kaj kelkajn monatojn poste ni disponigis interesan sumon, sen rimarki iun ajn ĝenon.

Pro ŝia junaĝo pasigita sur agraro, Ruth estis tre proksima de la naturo, ŝatis ĝardenumi kaj longe diskuti pri la plantoj, la pluvo, kies kvanton ŝi precize mezuris.

Kvankam ŝia konduto spegulis la bonan edukon kiun ŝi ricevis en melburna internulejo, de tempo al tempo ŝi faris neatenditan iom krudan rimarkon. Jen la pruvo ke ŝi ne ŝatis vualigi kelkajn aspektojn de la vivo.

Ruth estis ankaŭ tre saĝa persono, kiu profunde pripensis la rilatojn inter homoj. Per lerta mallonga frazo, akompanata de rideto, ŝi pensigis la aŭskultanton.

Mi ricevis la privilegion renkonti pacaman, afablan, menslarĝan personon kia estis Ruth.

Ruth, vi deziris trovi vian karan Gerald-on. Via reuniĝo estu ĝoja. □



### POR RIDIGI VIN



Raportisto intervjuas viron en naturista plaĝo:

“Ĉu vi havas infanojn?”

“Jes, de la nuna, tria edzino mi havas ses. De la dua, ok; kaj de la unua, same ses.”

“Do, en tiu kazo povas esti ke vi eĉ ne estas nudisto, sed vi simple ne havis tempon revestiĝi.”

[El *Naturista vivo*, numero 66, 2002]

## Propraj nomoj en Esperanto konsiloj de Marcel Leereveld

La Propraj Nomoj ests baze substantivoj. En Esperanto ekzistas du specoj de propraj nomoj: tiuj kiuj troviĝas en sia origina (se necese, latinigita) ortografio: *Sheffield, Owen, Van Gogh, Humphrey, Seamus, Wagga Wagga*, kun necerta prononco; kaj tiuj, kiuj sone kaj skribe estas esperantigitaj, kiaj: *Ejfeluro, Danto, Nigromontaro, Petro, Elizabeto*. Ni traktas ĉi sekve nur la lastan grupon.

Propra Nomo (*Johano, Tokio*) diferenças de ordinara (komuna) nomo (*libro, estonteco*) per tio ke ĝi indikas nur unu specialan ulon aŭ aĵon (malofte econ aŭ adon). El tio sekvas ke normale (= nefigure) ĝi estas uzebla nur en la singularo.

La Propra Nomo obeas certajn regulojn specialajn, kaj cetera sekvas la ĝeneralajn regulojn por ĉiuj substantivoj. Tiuj ĝeneralaj reguloj aplikendaj al la Propraj Nomoj inkluzivas la jenajn:

- 1) Ili finiĝas per -o: *Elizabeto, Vilhelmino*.
- 2) Ili ricevas la akuzativan finaĵon -n: *Karlon, Eŭropon*.
- 3) Ili povas ricevi la pluralajn -j kaj -n, se uzataj figure: *Ĉiujn Petrojn en la mondo*.
- 4) Ili skribiĝas en unu vorto (por unu nocio): *Sudaŭstralio*.
- 5) Ili povas konsisti en kunmetaĵo, sen streketo: *Nordmaro, Mortmaro, Neĝulino, Blankrusujo, Riodejanejro, Galilemaro, Sanfrancisko*.
- 6) Ilin povas difini adjektivo(j): *bela Venecio, juna Vilhelmo, Karlo la Granda*.
- 7) Eblas alikategoriigi kaj derivi ilin: *afrika, amerikemigi*.

8) Ili povas uzati en formo de (persona) pronomo: *Mi, ĝi, ŝi*.

9) Ili formas ĝenerale la kernon de la gramatika subjekto, objekto, kaj prepozitivaj suplemento kaj adjekto: *Mi (= Marcelo) renkontis Katerinon de Hungarujo en Italujo*.

La specialaj reguloj, kiuj ne aplikiĝas al la ĝeneralaj nomoj, estas la jenaj limigoj:

1) Propra Nomo normale estas nur en la sigularo: *Karlo, Ateno, Kairo, Rokmontaro*.

2) Ĝi ne ricevas la artikolon: *Hago, Kairo, Jarao (= the River Yarra), Neĝrivero, Misisipo, Blumontaro*.

3) Ĝi ĉiam skribiĝas per komenca ĉeflitero. Ankaŭ la adjektivajn formojn kelkiuj (erare) skribas per ĉeflitero: *Kanada, Johana prononcado*.<sup>1</sup> Aliaj per ordinara litero: *franca, johana prononcado*.

Anglolingvanoj tendencas falsi kelkajn regulojn en Esperanto, ekz. skribante ankaŭ kelkajn komunajn nomojn per ĉeflitero: *Franco, Melburnano, Novzelandano, Brito*.<sup>1</sup> Zamenhof sciis ke tio estas malĝusta (do devas esti: *franco, melburnano, novzelandano, brito*).<sup>2</sup>

Ofte Propra Nomo uzatas kun aŭ kiel substantiva epiteto:

1) Kun apozicio: *La urbestro enoficigis Kamronon, sian filon; Ŝi edziniĝis kun Davido, sia kuzo*.

1. Kutime oni ne rigardas la uzon de majuskloj kaj minuskloj parto de la gramatiko, do multaj gramatikistoj malakordas kun Marcelo rilate al ĉu temas pri "erareco" — [d]

2. Efektive, en la Fundamento Zamenhof ofte majuskligis tiujn vortojn: Hispano, Germano, Franco, Rusujano, kc. (ekz. vidu Ekzercojn 35 kaj 37. — [d])

- 2) Kiel apozicio: *Li forsendis sian filon, Karlon. Li foriris kun sia frato, Manfredo.*
- 3) Kun ekvivalento: *Li vivis tempe de Nero, alinome la Kruelulo. Ni konis Hajlon, aŭ la Leonon de Abisenujo.*
- 4) Kiel ekvivalento: *La plej bonan lingvon, t.e. Esperanton,... Lia ŝatata hundo, nome Fidelêjo.*
- 5) Kun nominacio: *Karlo la Granda. Mozeo de la Judoj.*
- 6) Kiel nominacio: *Mi ricevis la gazeton "Esperanto". Ili forsendis sian frat-inon Rebeko.* □

## Alvoko

de Marcel Leereveld

Intervjui mikrofone estas lernebla lerto, speco de arto. Se oni ne lernis tiun arton, profesie, oni tamen povas uzi siajn registraĵojn en la familio, inter amikoj, kaj en niaj Esperantokluboj. Sed sen lerninteco la registraĵoj estas neniam utilaj por publika uzo, pro neintencita fuŝetiĝo. Tion montras la radio-elsenditaj intervjuoj esperantaj: ili estas malbona propagando por Esperanto se ne-esperantistoj aŭdas ilin, eĉ se ili neniom komprenas pri la enhavo. Esperantistaj aŭskultantoj emas pardoni la malbonaĵon, ĉar mankas al ni profesiaj intervjuistoj: en la lando de blinduloj reĝas unuokululo.

Mi tamen opinias ke ni devas ne tro indulgi, kaj ke ni devos peni kontentige fari la intervjuan laboron. Tio signifas ke tiuj el ni kiuj plenigas siajn kasedojn per intervjuoj, faros multe pli valoran kaj uzeblan laboron se ili lernas kaj spertiĝas en la arto de intervjuado, ĉar post tio ili produktos registraĵojn kiujn ni povos uzi publike,

ekzemple en radiostacioj aŭ por sendi eksterlanden.

Bedaŭrinde mi konas en Aŭstralio neniun esperantistan spertulon pri la intervjuado, neniun kiu lernintas la arton. Sed se ekzistas, tiu persono povos esti tre valora instrui al ni la arton, ekzemple dum somerkursaro. Alternative, AEA eble deziros iomete subvencii finance iun membron kiu proponos sin por lerni la kapablon (tio kostas monon kaj tempon) por poste instrui nin, prefere dum somerkursaro, ĉar en ĉiu urbo estas nur unu aŭ du esperantistoj kiuj ŝatas intervjui cele al pli vasta publikigo ekster niaj kluboj.

Kiu proponos sin? Vi faros grandan servon al nia movado. □

## Ni bonvenigas

kiel novajn dumvivajn membrojn:

Jim Jones kaj Doreen Lawson, ambaŭ loĝantaj en Brunswick Heads, NSW. □



**POR RIDIGI  
VIN**



Infanaj anedoktoj

En la lunĉejo:

“Kiom kostas taso da kafo?”

“Kvindek centavojn.”

“Kaj la sukero?”

“Neniom kostas, estas senpage.”

“Mi volas du kilogramojn da sukero.”

Instruisto: “Ĉu ne estas mirinde ke birdoj scipovas flugi al Afriko sen mapo kaj kompas?”

Eta knabo: “Sed, estus ja eĉ pli mirinde, se birdoj kunportus mapon kaj kompason!”

[El Eventoj] □

MATUZO



Tenorio

El *La lampiro* aŭgusto-novembro 2002



# Skribas la Legantoj



## Skribas Donald Rogers:

Marcel Leereveld (*ELK* 59) pravas: pri malbona stilo kaj eĉ pri gramatikaj eraroj, ofte estas afero de opinio. Oni povas diri ke Zamenhof foje verkis nekonsekvence. Ŝajne li eksperimentis pri diversaj rimedoj; eble li ŝanĝis sian decidon pri iuj aferoj. Kelkaj liaj formoj ne plu uzatas. Kiel diris Zamenhof mem: “Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu farigos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo.” Tamen certe ekzistas malkonsento inter eĉ spertaj esperantistoj pri gramatikaj aferoj.

Ĉi tie mi volas diskuti tri demandojn:

Kiel oni distingu inter objekto kaj adjekto? Ĉu oni bezonas distingi ilin?

Ĉu ĉiuj transitivaj verboj havas pasivon kaj ĉu nur transitivaj verboj povas havi pasivon?

Ĉu nur transitivaj verboj povas havi akuzativan objekton?

Mi demandas ĉar mi opinias ke tiuj demandoj ne estas kontentige klarigitaj en la gramatikaj instruverkoj.

## 1. Kiel oni distingu inter objekto kaj adjekto? Ĉu oni bezonas distingi ilin?

En *Fundamento de Esperanto* Zamenhof ne menciis la gramatikajn terminojn *objekto*, *adjekto*, *transitiva*, *ne-transitiva*. Li provis montri la regulojn per ekzemploj.

En Ekzerco 29 li skribis:

Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion “je”. Sed estas bone uzadi la vorton “je” kiel eble plej malofte. Anstataŭ la vorto “je” ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio. — Mi ridas je lia naiveco (aŭ mi ridas pro lia naiveco, aŭ: mi ridas lian naivecon). — Je la lasta fojo mi vidas lin ĉe vi (aŭ: la lastan fojon). — Mi veturis du tagojn kaj unu nokton. — Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ: mian perditan feliĉon). — El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas

aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon. Ekzemple, ni povas diri “obei al la patro” kaj “obei la patron” (anstataŭ “obei je la patro”). Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la sencio ĉi malpermesas; ekzemple: ni povas diri “pardoni al la malamiko” kaj “pardoni la malamikon”, sed ni devas diri ĉiam “pardoni al la malamiko lian kulpon”.

Notu ke Zamenhof skribis “ĉu ĝi estas aktiva”, ne “ĉu ĝi estas transitiva”. Kion tio signifas? Ĝenerale *aktiva* kontrastas kun *pasiva*. Aliflanke *transitiva* kontrastas kun *netransitiva*, kaj *netransitiva* ne estas sama al *pasiva*. Tial mi supozas, ke *aktiva* ne egalas al *transitiva*.

Mi ankaŭ supozas, ke li intencis ke *ridas* kaj *sopiras* estas aktivaj laŭ lia propra lingva modelo. Laŭ *PIV* ambaŭ tiuj verboj estas netransitivaj. Tamen laŭ *PV*, *ridas* estas netransitiva sed *sopiras* estas “<sup>x</sup>” (tr kaj ntr). Ŝajne li intencis ke multe pli da verboj estu aktivaj ol estas transitivaj laŭ *PIV*.

La ekzemploj pri *pardoni* ŝajnas montri ke, ĉe dudirektaj verboj, li emis akuzativigi tiun komplementon al kiu la verbo pli forte transiras (tion oni ofte nomas la “rekta objekto”). Mi supozas ke tiu komplemento estus la subjekto de pasiva formo, do *lia kulpo estas pardonita* aŭ simile. Tamen *PIV* notas ekzemplojn kie oni uzis pasivon kun la malpli transira objekto (t.n. “nerekta objekto”): *kiu konfesas kaj forlasas, tiu estos pardonita<sup>x</sup>*.

En la kazo de *instrui*, ambaŭ objektoj povas esti la subjekto de pasivaj formoj: *scioj estis instruataj al li<sup>Z</sup>*, “li estis instruita en privata lernejo” *PIV*. Tamen la lasta ekzemplo ne estas de Zamenhof.

Konsideru simplajn frazojn aktivajn kaj pasivajn:

1a. *li helpis min je ĵaŭdo*

1b. *mi estas helpita de li je ĵaŭdo*

2a. *li helpis al mi ĵaŭdon*

2b. *mi estas helpita de li ĵaŭdon*

Ŝajnas ke oni ne povas distingi objektojn disde adjektoj sole per sintakso kaj morfologio, ĉar objektoj kaj adjektoj havas la saman strukturon. Per la semantiko ni konstatas ke la aktivaj frazoj 1a kaj 2a havas la pasivajn formojn 1b kaj 2b. En 2b *ĵaŭdo* ne povas esti la subjekto de la pasivo, ĉar tiel tiu ne havas taŭgan sencion. Ni povas diri ke en 1a kaj 2a *mi(n)* estas objekto kaj *ĵaŭdo(n)* estas adjekto. Ĉu ekzistas alia metodo?

Ofte adjektoj temas pri tempo, loko aŭ mezuro. En 1-2 *ĵaŭdo* temas pri tempo.

Waringhien (1959:159) skribis: “Zamenhof ne faris do distingon inter la objekta aŭ la adjekta okazo: por ambaŭ li formulis la saman regulon: ‘en ĉiuj okazoj, kiam ni ne scias, kian prepozicion uzi, ni povas uzi la akuzativon anstataŭ la prepozicio *je*’ (*La Esperantisto*, 1892).”

Gledhill (1998:70) skribis, ke estas malfacile distingi inter akuzativa anstataŭigo de adjektoj kaj de nerektaj komplementoj. Ekzistas emo anstataŭigi prepozicion per akuzativo aŭ eĉ adverba esprimo:

*je la lasta fojo* → *la lastan fojon* →  
*lastafoje*

Eĉ *PAG* (§176 Rim I) notas ke “ne estas ĉiam facile distingi inter nerekta objekto kaj adjekto”. Do ĉu oni bezonas distingi ilin? En la kutima gramatiko jes, ĉar pri tiuj aferoj temas la sintakso.

**2. Ĉu ĉiuj transitivaj verboj ha-**

## vas pasivon, kaj ĉu nur transitivaj verboj povas havi pasivon?

Laŭ klasikaj difinoj, Kiselman diris, pasivigeblaj verboj estas transitivaj. Tamen mi ne sukcesis trovi pasivajn ekzemplojn de la jenaj transitivaj (laŭ PIV) verboj: *rajti*, *devi*, *povi*. La kialo eble estas, ke tiuj verboj plej ofte havas infinitivan komplementon. Eble pro la manko de pasivo PV klasigis ilin kiel netransitivaj. Tamen *voli*, kiu estas simila, havas pasivajn ekzemplojn:

*Ĝi nomas agon aŭ staton sen montri, ĉu ĝi estas reala, imagata, fantazia aŭ volata, kaj sen montri tempon.* (Wennergren)

*Por plej bone esti volata, vestu vin bele, havu tonditajn harojn, ŝminku vin iomete, gardu vin pura.* (<http://www.geocities.com/marraskuu1978/flirtflirtflirt.html>)

Kelkaj gramatikistoj (ekzemple Waringhien kaj Kaloscay, PAG §116) konsideras ke *devi*, *povi*, *voli* estas modaj helpverboj kaj ne rajtas havi pasivon. Ili diris: “Kiam *voli* saĝnas havi akuzativan objekton, oni subkomprenas havi”. Aliflanke Bak (1994:81) skribis “Sed jen mi ne konsentas pri tiu opinio pro jenaj kialoj.

“Unue, la verboj ‘voli, devi, povi’ estas tute samaj kiel ordinara transitivaj verboj, prenante post si objektojn de ordinara substantivo au infinitivo.” Li prezentas pliajn kialojn, sed ili ne intime rilatas al la nuna demando. Mi ne trovis realajn ekzemplojn de “ordinara substantivo” kun *devi* au *povi*, sed PIV havas unu tian (vidu la noton post la tabelo [p.16, ĉisube]).

Ĉu nur transitivaj verboj povas havi pasivon? Logike tio ŝajnas prava, sed sube montritaj estas ekzemploj trovitaj en Interreto pri netransitivaj (laŭ kaj PIV kaj PV) verboj kun pasivaj for-

moj:

*La spektaklo de ili dancita konsistis el 3 partoj* <http://storm.prohosting.com/jesuo/k47uk.htm> Jesuo de las Heras

*Deklivo grimkata krutegas kaj altas, anhele ni spiras, senfortaj ni haltas.* <http://koti.mbnet.fi/~vesasari/tuotanto/anjaespe-x.html> Anja Karkiainen

*ke boato remata de ses viroj estas jus alveninta al la kajo* <http://members.tripod.com/~booton/Saradine.htm> Cecil Bean

*Mi divenas, ke ĝi eble estas rilatita al “mencii”.* <http://plaza22.mbn.or.jp/~gthmhk/keizi/keizi001.html>

*Jen la momento de la vivo, kara mia Sokrato, diris la Fremdulino el Mantiĝo, kiu, pli ol ia ajn alia, penvaloras esti vivata, la momento, kiam la homo kontemplas la belon en si mem!* [http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/nlr/nlr25/bankedo\\_platonou.html](http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/nlr/nlr25/bankedo_platonou.html) Waringhien

Por kompliki la aferon, multaj verboj havas, laŭ la vortaroj, kaj transitiva(j)n senco(j)n kaj netransitiva(j)n senco(j)n, ekzemple *blovi*, *fumi*.

Kiel tio eblas? Estas tri ebloj:

- La parolantoj eraras pri la uzado de la pasivoj
- La vortaristoj eraras pri la klasifiko de iuj verboj kiel transitivaj/netransitivaj
- Netransitivaj verboj povas havi pasivon

Foje okazas 1, sed tio ne klarigas ĉiujn ekzemplojn.

En kelkaj kazoj la diversaj vortaroj malkonsentas inter si pri la klaso de verboj. Jen kelkaj ekzemploj, kiujn mi rimarkis en PV kaj PIV:

Verbo	PV	PIV
devi	ntr	tr, kun sekvanta infinitivo
difuzi	ntr	tr
kanti	tr	tr, ntr
kontribui	x	ntr
kosti	tr	tr, ntr
odori	x	ntr
povi	ntr	tr*
profiti	x	ntr
radii	x	ntr
rajdi	x	ntr
rajti	ntr	tr
valori	x	tr

\**PIV*<sup>1</sup> havas nur unu ekzemplon pri *povi* kun akuzativa komplemento: *kion oni volas, tion oni povas*<sup>2</sup>; ĉiuj aliaj ekzemploj havas infinitivan komplementon, ekzemple: *du homoj povas pli multe fari ol unu*<sup>2</sup>.

Kiam unu vortaro kontraŭas la alian, ŝajne ne eblas ke ili ambaŭ pravas, do 2 okazas. Tamen estas ebleco ke la uzado ŝanĝiĝis inter la eldono de *PV* (1934) kaj de *PIV* (1970), sed mi dubas ke tio pravigas ĉiujn diferencojn. Se vortaroj nur priskribas la lingvon, eble ili ne kulpas pri la konfuzo (do 1 denove), sed mi opinias ke tiuj vortaroj estas iagrade preskribaj — ili celas normigi la lingvouzadon. Kiam ili difinas verbon netransitive kaj enmetas ŝajne transitivajn ekzemplojn, ili konfuzas.

Kiselman diris: “Se verbo estas registrita en *PIV* kiel kaj transitiva kaj netransitiva... Kelkfoje oni povas diri ke temas pri du malsamaj verboj, kelkfoje la transitiva verbo estas nur absolute uzata (t.e. sen komplemento).” Mi opinias ke sufiĉe ofte vortaroj markas verbon kiel netransitiva kiam ĝi vere estas transitiva sed ofte uzata

sen menciita objekto.

Zamenhof skribis: “eĉ de vortoj, kiuj per si mem ne postulas la akuzativon, vi povas... libere ĉiam fari pasivon, se nur la senco de tiu pasivo estos komprenebla” (*PAG* §119 B). Do ŝajne Zamenhof subtenis 3. Sed ĉu vere? Li ne uzis la terminojn *transitiva* kaj *netransitiva*, en tiu frazo. Mi kredas ke li uzis alian modelon de la gramatiko. La ĝusta respondo al demando 2 dependas de la uzata gramatika modelo. Mi supozas ke laŭ la modelo de Zamenhof, nur aktivaj verboj povas havi pasivan formon.

### 3. Ĉu nur transitivaj verboj povas havi akuzativan objekton?

*PAG* §178 Rim III: “ĉiu verbo povas esti uzata transitive, se la tiel formita esprimo povas havi senco. Tio devenas el la 14a regulo, ke ĉiu prepozicio estas anstataŭigebla per la akuzativa kazo. Escepto estas nur la prepozicioj demovaj (de, el): ilian anstataŭigon malhelpas la almoava subsenco de la akuzativo:

*sidi seĝon; kuŝi liton; iri vojon*

kvankam ordinare oni uzas post ili prepozicion... Cetere oni ne povas uzi verbon transitive, se per tio oni ŝanĝus ĝian signifon: oni ne povas diri *bruli lignon*, ĉar bruli ne povas havi la senco de *bruligi*”.

Mi ne sentas avantaĝon paroli pri “internaj objektoj” (*danci dancon, sonĝi sonĝon*, ktp). Kial inventi escepton por ili? Ni ankaŭ diras *danci valson, sonĝi inkubon, kanti gajajn kanzonojn*, ktp, tute analogie.

Do ni revenas al la demando kiel distingi objektojn kaj adjektojn, kaj kion intencis Zamenhof per la vorto “aktiva”? Eble la supra demando devus esti “ĉu nur aktivaj verboj povas havi akuzativan objekton?” kaj eble la

1. Temas pri la “malnova” *PIV* de 1970. La *Nova PIV* multe malpli certas pri la teorio de transitiveco rilate al certaj verboj. — [E]



respondo estus “jes”.

### Konkludo

La celo de ĉi tiu letero estas montri ke la kutimaj klarigoj de iuj gramatikaj aferoj ne estas tute kontentigaj, almenaŭ al mi. Ŝajnas ke la mensa lingvomodelo de Zamenhof ne tute kongruas kun tiu de postaj gramatikistoj. Lia termino “aktiva” ŝajne estas neklarigita. Tamen se iu scias kie Zamenhof klarigis la signifon, bonvolu informi nin.

### Agnosko

Mi agnoskas ke mi diskutis ĉi tiun temon kun membroj de la Esperanto-Rondo de Wellington, sed la jenaj opinioj kaj eventualaj eraroj estas la miaj.

### Bibliografio

Bak Giuan. 1994. *Gramatiko de Esperanto*. Seulo: Hanshin Eldonejo.

Gledhill, Christopher. 1998. “The Grammar of Esperanto, a Corpus-

based Description”. LINCOM EUROPA.

Grosjean-Maupin, E. 1934. *Plena vortaro de Esperanto*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.

Kalocsay, Kalman kaj Gaston Waringhien. 1980. *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto Asocio.

Kiselman, Christer O. 1995. “Transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto”. <http://www.math.uu.se/~kiselman/transitiv.pdf>, ankaŭ en *La stato kaj estonteco de la Internacia Lingvo*.

Waringhien, Gaston. 1959. *Lingvo kaj vivo*. La Laguna: Stafeto.

Waringhien, Gaston, red. 1970. *Plena ilustrita vortaro de Esperanto*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.

Wennergren, Bertilo. 1999. *Plena manlibro de Esperanta gramatiko*, versio 9,0. <http://purl.oclc.org/net/pmeg>

## Kelkaj komentoj de la redaktoro

Zamenhof celis ke Esperanto estu “intergenta” komunikilo por nuligi diskriminacion. Li celis ke Esperanto estu la dua lingvo de ĉiu homo — laŭsupoze, ĉiu homo en la mondo. Ĝi estu la lingvo per kiu oni komunikadu kun homoj kiuj venas el alia kultura fono aŭ el alia lingva fono. Kaj ĝi estu plenkapabla lingvo. Li neniam hezitis uzi “novajn vortojn” aŭ ĉiajn vortaĵojn, kiam li trovis ilin bezonaj kaj utilaj.

Facileco de lernado ne povas esti ĉefbazo de la lingvo — efektive, Esperanto estas malpli facile lernebla por, ekz., ĉino aŭ tajlandano aŭ japano aŭ nepalano ol estus Volapük. La “malfacileco” de Volapük simple signifis ke eŭropanoj trovis malfacilon rekonii senlerne ĝiajn vortradikojn (ekz. “pük”

< “speech”); sed por la plej multaj personoj en la mondo, t.e. hejmparolantoj de neeŭropaj lingvoj, “pük” estas almenaŭ egale facile lernebla kiel “parol”, kaj eĉ havas avantaĝojn — laŭ la karaktero de la volapuka lingvo.

En la praktiko, kaj Volapük kaj Esperanto estis unue diskonigitaj en Eŭropo, kaj la eŭropanoj nature trovis la aspekton de Esperanto pli facile rekoniebla, do por ili “pli facila”. Sed Esperanto (ĉar, ankaŭ en la praktiko, neniu plu serioze apogas Volapukon) devas esti interlingvo por la tuta mondo, ne nur kaj ne specife de Eŭropo.

Ŝajnas al mi ke estas klare, ke Zamenhof ne supozis ke la gramatiko de Esperanto devas 100%e konformi al la kutimoj de la eŭropaj lingvoj. Li estis

klerega pri la hebrea lingvo, kaj lia scio de la hebrea lingvo estis pli granda kaj profunda ol lia kapablo rilate al la germana, franca, angla, latina, aŭ greka. Malgraŭ la troentuziasma propagando de Zamenhofadorantoj, mi trovas neniun klaran indikon ke li kapablis legi la antikvan grekan lingvon, nek la latinan. Ke li bone povosciis la rusan kaj la polan estas pli-malpli certe. Sed lia uzado de Esperanto ne estis bazita sur gramatikaj teorioj.

Kiel eksperto pri la klasika hebrea lingvo, mi trovas tute ekster dubo (almenaŭ por mi) ke granda parto de la verbsistemo de Esperanto estis influita pli de la hebrea lingvo ol de la eŭropaj lingvoj; kelkriate, la verbsistemo de Esperanto estas kvazaŭ kunmeto de la hebrea gramatiko kaj la (plejparte okcident-)eŭropa komuna vortprovizo.

Ni ne rajtas deklari ke Zamenhof “eraris” simple ĉar li ne bazis sian esperantuzadon sur tradiciaj eŭropaj gramatikajoj.

Mi deziras elstarigi unu punkton tiurilate:

Ni scias ke samtempe kun Zamenhof kaj la ekapero de Esperanto, René de Saussure instruadis tute alian gramatikanalizon sistemon; kaj en la tre frua parto de la Esperanta movado, lia frato Ferdinand de Saussure estis unu el la gvidantaj gramatikistoj de Esperanto. Ĉu estas tre fantazie, supozi ke Zamenhof konis la principojn de René — ke eble eĉ en 1887 li estis influata de la ideoj de la “nova lingvistiko” kiuj en la posta 20a jarcento konkeris la lingvistikan mondon kaj fariĝis norma?

Fundamenta en la principoj de René de Saussure estis: ke oni ne prenas la eŭropajn lingvojn kiel la bazon de kon-

struado de analizado de lingvoj, sed entreprenas rigardi gramatikon laŭ vidpunkto plene neŭtrala, kaj sen supozi ke la eŭropa historio de analizo de gramatiko estas eterne ĉie valida. Esence lia vidpunkto pravis. Pri tio mi mem ne dubas. Mi unue komencis studi Esperanton en 1946; jam en 1947 mi konatiĝis kun la laborado de René de Saussure, kaj miregigis min ke Esperanto estas kvazaŭ modelo de la de-Saussure-a vidpunkto.

Mi volas emfazi du punktojn:

1) Ĉar Esperanto celas — laŭ la vidpunkto de Zamenhof kaj de mi mem — esti ne “help-lingvo” sed plenkapabla dua lingvo por ĉiuj homoj, ĝi devas havi vortprovizon kiu kapablas uziĝadi por ĉia celo, ĉu komerca, literatura, konversacia, teknika, arta, kc. Ĝi devas havi bazon ne sur la principo ke “eŭropanoj povas facile lerni minimume sin esprimi per ĝi” sed sur la principo ke denaskaj parolantoj kaj uzantoj de Esperanto trovu ĝin plenkontentiga komunikilo por ĉiu celo.

2) Ju pli da reguloj, des pli malfacila Esperanto fariĝas por ĉiu uzanto de Esperanto, ĉu komencanto, ĉu denaska esperantoparolulo.

Kiam ajn oni entreprenas fari regulon surbaze de antaŭsupozo ne tuj evidenta al la sperta parolanto, tiu regulo estas tre duba. Se sperta parolanto de Esperanto ne “instinkte” scias kiuj verboj estas “transitivaj” aŭ “netransitivaj”, “adjektivradikaj” aŭ “verbradikaj”, mi demandas al mi ĉu efektive Zamenhof celis tiajn distingojn en Esperanto. Laŭ mia opinio Donald Rogers plene pravas ke la principo uzita de Zamenhof estis ĉu iu vortajo havas evidentan signifon, negrave ĉu ĝi akordas aŭ malakordas kun gramatika argmento. ☐ □

# For the Beginner

The big news is that the new all-Esperanto dictionary, *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto*<sup>1</sup> (*NPIV*) has finally appeared. It is a completely revised and updated edition of *Plena ilustrita vortaro de Esperanto* (*PIV*) published in 1970. Over the years *PIV* gained a reputation — not always merited — of being *the* definitive Esperanto dictionary. For better or for worse, “It’s in *PIV*” became the familiar defence for sometimes questionable word usage. In part, this was because (as I pointed out in the last issue of *ENK*) the Akademio de Esperanto had long shirked its duty to keep an eye on language development and language customs in Esperanto in order to define good usage.

The new *NPIV* has had the benefit of its editors being in close collaboration with the Akademio de Esperanto, in fact its principal editors are members of the Akademio; and, in addition, modern linguistic principles — plus a whole lot of common sense — have been the major influence on its contents. The result is a highly trustworthy piece of work. Computer technology has also played a major role in making it possible to keep a high degree of consistency in this enormous work (something that notoriously could not be said of the old *PIV*). Inevitably there are pros and cons in regard to individual points, but all in all this is a truly magnificent achievement by a large group of very devoted language specialists. And, also due to computer technology, hopefully we will not have to wait another 32 years before new revisions and improvements are made.

Word of the month:

## tiparo

This translates into English as “fonts” or “typeface”.

a	a	a	a
normala “roman”	<i>kursiva</i> “italics”	<b>dika</b> <b>bold</b>	<i>dika kursiva</i> <b>bold italics</b>
Minuskloj			
“Lowercase letters” so called because printers kept them in a wooden case on the lower half of their work table.			

Originally when printing was introduced in the West in the first half of the 1400s, someone had to design the exact shape of each letter. This was a very difficult task, particularly since every letter of the alphabet had to come in a wide variety of forms, not just lower-

case and uppercase, but also italics, bold face, various sizes, and special decorative forms. And, of course, there was a multitude of other characters to design also: punctuation marks, numerals, etc. Over the years thousands of designers produced vast numbers of styles, or “typefaces”. In English the word “font” sometimes refers to a complete matching set (as in the illustration above); other times it refers to a style within a set. Thus some font sellers refer to the design used for this journal, *New Century Schoolbook*, as “one font” or as “four fonts”.

1. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, 2002. 1265pp., hard bound. Price: €73 = approx. \$150 Australian, with postage.

In Esperanto, “tipo” refers to the design of one specific item, such as “a”, and “tiparo” refers to the entire set.

For nearly five centuries each design of each letter was reproduced as hundreds of individual metal or wooden pieces, which the printer placed, by hand, into a shallow box, face up, to make the text of what was to be printed. “Typesetting” meant this process. Printing meant that ink was spread on the face of the letters (thus the term “typeface”), and the whole was then pressed against paper to make a printed sheet. The individual pieces of type were then separated, replaced in their individual holders, to be reused.

When computers took over as the method of preparing text, about 12-15 years ago, the old terminology was kept. But all of the designs of letters had to be redrawn for the computer. Special computer programs were devised for designing letters, so that any skilled computer user could design specialty typefaces. Preparing text for publication is still called “typesetting” “kompostado”, even though it is now done entirely by computer. — [a]

---

## *Kiss ~ “Keep it Simple, Stupid”*

Because people from some hundreds of language backgrounds form the community of Esperanto users, misunderstandings can easily arise if style is unnecessarily complicated. If you have ever tried to learn classical Latin or Greek, or modern German or Russian or Japanese, you will have discovered that there is far more to using a language than just learning words and rules of grammar.

One of the most troublesome problems in learning another language is the order of words. For example, German is notorious for tending to place its main verbs at the ends of its sentences, while in English we feel we need them very near the beginning. In classical Latin or Greek the subject of the sentence could come very far along, sometimes adjectives and their nouns were separated by even dozens of words, and an intricate set of grammatical cases made it possible to make statements that a modern English speaker finds unintelligible, because English has done away with most grammatical markers.

As an example, here is a typical Greek text from Plato, translated literally, with the original order of words:

*Seeing well far away us towards house walking Polemarkhos who Kephalos' ordered running the boy wait to order.*<sup>1</sup>

In English this only begins to make sense when we rearrange the words:

*Well, Polemarkhos Kephalos, when from far away he saw us walking towards the house, ordered his boy to run and order us to wait.*

---

1. Translated from part of the first paragraph of Plato's *Republic*.

With some imagination you may realize that our English text probably would have been just as difficult for Plato to understand, because he was not only used to using words in a different order from ours, but we have virtually nothing by way of grammatical markers to indicate which word goes with which. *English uses a fairly fixed word order instead of special grammatical markers in order to show the meaning of the words.* Classical Greek, in contrast, had special grammatical markers on virtually every word to express the word's function in a sentence, and the order of words was decided almost entirely by what sort of emphasis the speaker wished to place on individual items.

My own Esperanto translation of the text reads:

*Polemarĥo, la filo de Kefalo, vidis nin de malproksime dum ni iradis hejmen, kaj li ordonis al sia sklavo kuri al ni kaj ordoni ke ni atendu.*<sup>1</sup>

If you compare this with my English translation, you will see some striking differences due to the different nature of natural Esperanto style.

In Esperanto, tradition has established the pattern: *noun (subject), verb, object of verb*, with words grouped together according to units of meaning:

Unit 1: *Polemarĥo, la filo de Kefalo, vidis nin*

Unit 2: *dum ni iradis hejmen*

Unit 3: + *li ordonis al sia sklavo*

Unit 4: *kuri al ni*

Unit 5: + *ordoni ke ni atendu*

Units 1 and 2 give us the subject of the sentence and the subject's first action (namely, that he saw us), along with the time of the event.

Unit 3 tells us the subject's second action (namely, that he gave his slave orders).

Units 4 and 5 tell us the two orders he gave the slave, to be performed one after the other.

The differences in word order and style between the Esperanto and the English translations are much smaller than between the original Greek and either of these languages, but they are still significant. A literal translation of my English version into Esperanto would be more or less understandable, but very poor style and probably would make the reader pause to work through it.

As I mentioned in an earlier article,<sup>2</sup> participles (*-ing* and *-ed*-words) are used in normal Esperanto style primarily for the purpose of emphasis. Generally, simple verb forms are preferred. This is very different from English, and also from Greek, where they are frequent. □

1. From Platono: *La Respubliko*, tr. Donald Broadribb. Published by the Australian Esperanto Association, 1993.

2. *ENK* 10/4 July-August 2002, p.16

# Postkongresa vojaĝo tra Nov-Zelando

de Tereza Kapista

Post la kongreso 4 aŭstralianoj, 1 japanino, 1 jugoslavino, kaj Jo Horton la organizantino faris grandan vojaĝon al Suda Insulo.

De Wellington ni ekis per pramo Transislander al Picton. Ni estis tre kontentaj pro la servado sur la ŝipo, la vojaĝo estis agrabla. En Picton kvar anoj luis duan aŭton, kaj kun du aŭtoj ni ekis al Kaikoura.

Tie ni tranoktis en hotelo konstruita en la jaro 1921, sed kiu estis bone ekipita, kaj varmaj ĉambroj atendis nin. Ni havis necesejon kaj duŝejon en koridoro, tamen ni pagis nur po \$16. La aliaj loĝis en bela motelo.

De tie ni direktiĝis al Christchurch. Tio okazis post la ega ŝtormo, survoje estis grandegaj ŝtonoj, eĉ eljetitan fokon ni vidis, kaj renversitan aŭton. Tamen ni renkontis ankaŭ maŝinojn kiuj purigis la aŭtovojon.

Ni dum kvar noktoj restis en Bergli Hill, Teddington, proksime al Lyttelton, ĉe Rowena MacGill, kies domo estas vera vilaĝa paradizo. Ŝi gastigis min senpage, pruvante la esperantistan solidarecon. Ni ĝuis la homfaritajn diversajn manĝaĵojn kaj la pomukon kiun Max elpremis el freŝaj pomoj por ni. Ĉiutage ni veturis al Christchurch, kie ni vizitis la muzeon, botanikan ĝardenon, kaj la antarktikan centron. Ĉar ni revenis iom lacaj, la eta spao (bankuvo kun pumpiloj kiuj masaĝas la korpon) bonvenis kaj refreŝigis nin. Ĉe Rowena ni havis renkontiĝon kun esperantistoj de Christchurch, kaj manĝante, trinkante ni pasigis agrablan tagon. Ankaŭ ili helpis nin en la urbovizitado. Ni rekomendas la domon de Rowena

al ĉiuj!

Poste ni restis ĉe Lago Tekapo. Ni ĝuis la ordigitan centron de Cromwell kun pasejoj de bele aranĝitaj vendejoj. Ni haltis en Arrowtown, kie ni vizitis la areon de la unuaj orministoj — ĉinoj kiuj estis la unuaj venantaj kiel ministoj en NZ. Iliaj ŝtonaj dometoj estas konservitaj. Ni tranoktis en Queenstown. Ĝuis la belecon de la lago.

La sekva tranokto okazis en Te Anau, de kie ni veturis al Milford Sound. Kaj tie per ŝipo ekskuris tra la fjordo. (La grupo pagis la ŝipveturon por mi, kiel naskiĝtagan donacon, denova pruvo pri esperantista solidareco). Tio estis belega vojaĝo inter altaj montoj kun multaj akvofaloj. Ne mankis la turistoj.

De Te Anau ni vojaĝis al Wanaka. La lagoj Wanaka kaj Hawea estis milde-ĉarmaj. Ni daŭrigis laŭ Rivero Haast ĝis denove atingi Tasmanian Maron. Tie ni ĝuis Glaĉeron Franz Joseph, kie denove abundis la turistoj. Sed ĉar la glacimonto iom post iom malgrandiĝas, ni devis piediri dum preskaŭ horo. Sed la natura beleco rekompencis nian penon. La sekva nia haltejo estis en Ross, ormineja urbo, kie ankoraŭ nun ekzistas la surfaca ekspluatado. Tie ni vizitis la muzeon pri orminado.

En Greymouth ni kun kontento konatiĝis kun la maniero kiel oni prilaboras la "verdŝtonon". De tie niaj kvar grupanoj, redoninte la aŭton, prenis trajnon al Christchurch de kie ni forflugis hejmen.

Ni ĝuis ankaŭ la panŝtonajn rokojn de Punakaiki, kaj spertis la fenomenon kiam la fortaj ondoj enpenetras la

rokajn kavojn kaj kun forto elĵetiĝas en formo de akvoŝprucado interroka. La apuda dolĉaĵejo liveras bongustajn patkukojn kun ŝaŭmkremo kaj fruktoj. Ni frandis ankaŭ tion. Survoje al Cape Foulwind ni vizitis rokojn kie vivadas la fokoj en iuspecaj kolonioj.

En Westport ni denove tranoktis, de tie ni direktiĝis al Motueka tra Gorĝo Buller. En Takaka ni estis gastigitaj ĉe amikinoj de Jo: Diana, kaj Ruth. Diana antaŭ nia veno anoncis en ĵurnalo ke venos esperantista grupo al ilia domo, kaj ke homoj kiuj interesiĝas pri Esperanto estos bonvenaj. Kaj post kunmanĝado kaj parolado pri Esperanto, du homoj anoncis sin por la Korresponda Kurso. Gwenda Sutton diras ke ili serioze resendadas la taskojn. Jen maniero akiri novajn esperantistojn.

En Golden Bay ni iris al Farewell Spit kaj lunciis tie. Ankaŭ kun niaj dommastrinoj ni vizitis Fontojn Pupu, kies kristalpura akvo ravis nin. Tiu ĉarma loko estas nekonata de multaj homoj.

Ni iris al Monteto Tasman, kie ekzistas memortabulo. Entuziasme ni ĝuis la multkolorcon de ilia "Begonia Domo" kun multspecaj buntaj floroj. Tra Nelson ni alvenis al Picton, denove uzante la pramon, kaj alvenis Wellington-on. La trian tagon forvojaĝis ankaŭ Pat al Aŭstralio.

Ni komencis la grandan planitan vojaĝon al Norda Insulo. Venis la informo ke mortis Doug Horton, la frato de Jo, kaj ni rapidis al entombigo en New Plymouth. Ni devis fari longan veturon por ne malfrui la funebran memorservon.

Ni tranoktis ĉe bofrato de Jo. Post tio ni vizitis la Kavojn Waitomo, la kavon kun lumantaj vermoj, kio estis

vera spektaklo super niaj kapoj dum ni estis sidantaj en boatoj sur rivereto en absoluta mallumo. Vere unika travivaĵo, ne trovebla en aliaj lokoj. La granda kreanto — la naturo!

De Waitomo ni iris al Rotorua. La tuta urbo odoris je sulfuro. Tie ni restis dum tri tagoj. Tie ni unue vizitis Whakarewarewa-n kun gejseroj, bolanta koto, kaj aliaj fenomenoj fascinaj. En kunvendomo maoria ni spektis popoldancan programon kun maoria *haka* (militdanco) kaj aliaj dancoj kun bastonetoj kaj pilketoj. En la sama loko kun kontento ni vidis ankaŭ la folkorgrupon de ĉinoj. Ni ĉirkaŭiris Lagon Rotorua sur kiu ni vidis multajn nigrajn cigojn. Dumvoje ni haltis ĉe Akvofalo Okere. De tie ni survojis al Auckland.

En Auckland ni restis kelkajn tagojn ĉe Marieke Bax. La duan vesperon okazis kunveno en ŝia domo kun esperantistoj el Auckland. Ĉiuj alportis ion por manĝi kaj trinki, fariĝis granda festeno. Ni agrable pridiskutis kelkajn problemojn de la esperanta movado, sed ne trovis solvon kiel akiri la junularon.

Ni vizitis la grandan Muzeon Domain kaj la Vintran Ĝardenon kun ekzotikaj floroj. La urbocentron kaj la havenon ni vizitis kun Stuart, parenco de Jo. Mi kontente vagadis tra la granda subĉiela bazaro de etaj metiistoj kaj manlaboroj.

Antaŭ nia foriro, per sia aŭto Howard venis kaj prenis nin al Nordo: Helensville, Wellsford, Warkworth ĝis Leigh. Ni vizitis ankaŭ la tombejon kie estas liaj geavoj kaj gepatroj entombigitaj. Ni revenis tra Kabo Rodney, Puhoi kaj Orewa, kie ni estis regalitaj de Howard per riĉa manĝo.

Unu posttagmezon kun Jackie ni

piediris tra arbaro, kaj poste estis gastigitaj ĉe ŝi kaj Brian, kie denove ni renkontis Tomokon. Ni pasigis agrablajn posttagmezon.

De Auckland ni iris al Taupo. Vojaĝis laŭ la plej longa rivero de NZ, Waikato, kaj rigardis la ŝaŭmantan blank-bluan akvofalon Huka. De tie ni iris al Krateroj de la Luno. Granda areo kun diversaj gejseroj, bolanta koto, kaj truoj kiuj vaporas aŭ nur fumetas. Ankaŭ tie ne mankis la sulfurodoro.

Sur Lago Taupo ni prenis jet-rapidŝipeton por ĝui la lagon; sed ho ve! Ekestis ventego kun forta pluvo kaj ni faladis de sur grandaj ondoj kaj ree kaptis nin la venonta ondo, ni ne esperis denovan albordiĝon! Sed, fine ĉio estis en ordo.

Wairake ege impresis min, ĉar ĝi estas giganta vapor-elektronegiejo. Jen io kion kreis la homoj, per sia saĝo!

Ni poste kontrolis la aferon en Biblioteko de Wellington, kaj eksciis ke nun jam estas 6 da ili en NZ eĉ pli grandaj kaj pli novaj. Ni vizitis la Muzeon de vulkanoj kaj tertremoj, sennombrajn artgaleriojn, la Centron de la Mielo, artistojn-lignistojn, ceramikistojn. La termalejo de Orakeikorako, kie ni admiris la multkolorajn ŝtonajn kaskadojn, kiuj vaporas, kaj trafluas ilin fontakvojn. La ŝtonoj estas diverskoloraj pro la mineraloj kiuj kovras ilin post la forfluo de akvo. Kaj fine ĉio finiĝas en la lago. La lageto trankviligas la vizitantojn.

Sekvis Monto Maunganui kaj Tauranga. Glenys, amikino de Jo, akceptis nin kiel gastojn. Ni kun ŝi ĉirkaŭiris la "Monton", kaj observis la grandajn ŝarĝoŝipojn kiuj oftas en tiu havenego. Samvespere ni frandis fiŝojn kun frititaj terpomoj, en havena fiŝista restoracio. [El *Arĝenta filiko*, septembro 2002.] □

## Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj

de Bart Demeyere

Hieraŭ mi revenis de REF (Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj) en Hungario. Mi ege ĝojas ke mi partoprenis ĝin, ĉar mia celo, ke mia filo Thomas parolu pli da Esperanto, estis granda sukceso.

Antaŭ REF Thomas (3 jaroj kaj 2 monatoj) parolis preskaŭ nur nederlande kiam li spontanee alparolis al mi. Li uzis jam Esperantajn vortojn, sed ĉefe kiam mi ĵus mem uzis ilin. Sed rare tuta frazo, ĉar li ĉiam uzis "ik" anstataŭ "mi". Nur la kelkajn historiojn kiujn mi ĉiuvespere rakontis li konis parkere. Kiam mi turnis paĝon, li preskaŭ ĉion povis "legi". Li kompreneble bone komprenis Esperanton, ĉar mi nur alparolis lin Esperante.

Dum REF, en ĉiu tago mi aŭdis lin uzi pli da Esperanto ol en la antaŭa tago. Unue li uzis pli da o-vortoj kaj i-vortoj. Poste sekvis la a-vortoj kaj e-vortoj. Dume ankaŭ pli da Esperantaj prepozicioj aperis. La -as sufiĉe rapide aperis, sed por la -is kaj -os, li longe uzis strangajn verbokonstruojn kun respektive la nederlandaj helpverboj "hebben" (havi) kaj "gaan" (iri). Ĉe la fino venis "mi", "mia" kaj "esti". Plej laste venis la uzo de "ĉu". Ĉe la fino li ankaŭ kelkajn fojojn Esperantigis nedelandan vorton. Ekzemple, li iam diris "lustris" (Nederlande "luisteren") por "aŭskulti".

Remarkinde estas ke lia lingvouzo klare ŝanĝiĝis kvankam li en la komenco apenaŭ komunikis kun la aliaj partoprenantoj. Li preskaŭ ĉiam volis esti ĉe mi, aŭ ludis sole. Nur ĉe la fino li ankaŭ ŝatis ludi kun la aliaj infanoj.



Do, kion la ĉirkaŭaĵo povas fari!

Mi devas ankaŭ aldoni ke mi pli kaj pli ne volis kompreni lin kiam li parolis nederlande. Tion mi ankaŭ faris dum PSI (Paske) kaj IF (Novjare), sed apenaŭ havis rezulton. La problemo pri aliaj aranĝoj estas ke oni tro multe krokodilas, kio apenaŭ okazas en REF.

Post REF, nur unu tagon, Thomas nun ankaŭ al nederlandparolantoj parolas kaj respondas ĉefe Esperante. Mi vidos kiel evoluos.

Do, se vi ne sukcesas paroligi vian infanon Esperante, vi nun konas la solvon: REF! Mi esperas ke mi ne faras tro da reklamo, ĉar se venontjare, verŝajne en Francio, venas tro da nederlandparolantoj, mi timas ilian krokodiladon. Eble bone ke mi mencias ke REF ne akceptas homojn kiuj volas lerni Esperanton tie. Oni kontrolas ĉe konatoj ĉu oni parolas Esperanton en la familio aŭ ĉu la infanoj sufiĉe bone regas Esperanton. Krokodilado tute malhelpus la celon de REF.

Dum tri jaroj mi nur parolis Esperante al mia infano, kaj li apenaŭ parolis tiun lingvon, tio ne estis tre kontentiga. Nun mi estas tre feliĉa, mia granda peno havas rezulton.

--La ĉijara REF (Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj) okazis en aŭgusto, en la urbo Sikonda, Hungario. (<http://ref2002.freeweb.hu>

el la gazeto *Tefloro*  
[Fonto: *ret-info*]



## POR RIDIGI VIN



Lernanto: "Profesoro, laŭ mia opinio, mi ne meritis nulon en tiu ekzameno."

Profesoro: "Mi konsentas, sed ne ekzistas noto pli malgranda. [El Eventoj] □



## POR RIDIGI VIN



Onklo Frederiko

Estas sabatmateno, kaj Bob estas jam en la golfudejo. Subite li memoras ke li forgesis diri al sia edzino ke la lavaŝinriparisto venos ĉirkaŭ la 12-a horo. Bob iras al la klubeja telefono kaj telefonas al sia hejmo.

"Hola", diras knabineta voĉeto.

"He, karulineto, parolas Paĉjo, ĉu Panjo proksimas al la telefono?"

"Ne Paĉjo. Panjo estas supre en la dormoĉambro kun Onklo Frederiko."

Post paŭzeto diras Bob, "sed vi ja ne havas Onklon Frederikon, karulineto."

"Jes, mi havas, kaj li estas supre en la dormoĉambro kun Panjo."

"Bone. Iru supren kaj frapu la dormoĉambropordon, kaj kriegu al Panjo kaj Onklo Frederiko ke mia aŭto ĵus haltis ekster la domo."

"Bone, eĉ bonege, Paĉjo !"

Kelkajn minutojn poste la knabineto revenas al la telefono. "Nu, mi faris laŭ via deziro, Paĉjo."

"Kaj kio okazis?"

"Nu, Panjo elsaltis nuda el la lito kurante tien kaj reen, kriegante, tiam ŝi stumblis sur la tapiŝo, falis el la fenestro, kaj nun ŝi estas tute mortinta."

"Ho mia Dio ! Kaj kio pri Onklo Frederiko ?"

"Ankaŭ li elsaltis tute nuda el la lito. Li tre timegis kaj saltis el la malantaŭa fenestro en la naĝbasenon. Li estis forgesinta ke pasintan semajnon vi malplenigis la basenon por purigi ĝin, li do trafis la fundon de la baseno, kaj nun ankaŭ li estas tute mortinta."

Post longa paŭzeto. "Ĉu naĝbaseno? Ĉu via numero estas 8242 1460?"

[El *Tamen Plu*]



# El la Regionoj



**Nov-Zelando — raportas Gwenda Sutton:** Gratulojn al Ross Moore MNZM, kiun oni honoris pro lia servado en scienca administrado per la titolo *Member of the New Zealand Order of Merit*.

Bruno della Pozza estas italo kiu loĝas en Saipan, insuleto en norda Pacifiko. Li vizitis Wellington-on en majo kaj junio por ĉeesti ĵudan kunvenon kaj pacifikan ĵudĉampionecon. Li reprezentas Pacifikon pri ĵudo en la Olimpika Komitato.

Mi aranĝis kunvenon kie li distris Esperantistojn per piano. Oni renkontis lin en hejmo ĉe Silverstream. Bruno donis bildon de Italio per ludado de klasikaj melodioj. Li celas fari KD-on por doni bildon de diversaj landaj kantoj en esperantaj versioj.

Petro Smid, juĝisto kaj esperantisto el Hrnov en Ĉeĥio, vizitis Christchurch-on por partopreni la Mondan Naĝadan Ĉampionecon. Li vizitis min ĉe Wellington. Li foje helpas ĉe infankongresetoj.

En Internacia Lingva Semajno oni invitis min paroli pri Esperanto ĉe la kunveno de Japan-Societo de Wellington.

Ĉe UNANZ-kunveno de lingvoinstruistoj mi mallonge parolis pri Esperanto. Mi disdonis ekzemplerojn de la UEA-informilo de februaro 2000, *Update on Esperanto*.

[El *Arĝenta Filiko* septembro 2002]

— **Raportas Daphne Lawless:** Mi lastatempe havis la grandegan plezuron legi recenzojn pri mia KD *Undinal Songs / Undinaj Kantoj* en *Heroldo de Esperanto*. Giorgio Silfer, redaktoro,

priskribis miajn du esperantajn kantojn sur tiu disko tiel: “du perloj sub la *Suda Kruco*”.

Apud la tuta liriko de mia kanto “Hejmen mi flugus”, S-ro Silfer skribis: “De Nov-Zelando alvenas la novaĵo de plia profesia kantistino, kiu praktikas Esperanton ankaŭ en sia arto. Momente konata nur en la suda hemisfero, la voĉo de Daphne Lawless povus baldaŭ trovi ŝatantojn en la vasta Esperantio. Certe ŝi havas la kvalitojn por fariĝi unu el la steloj de nia muzika firmamento.”

Krom la fakto ke mi ne taksas min tre “profesia” — mi bezonus pli da mono por tio! — oni povas vidi kial tre plaĉas al mi tia recenzo! Mi nun estas “mond fama en Esperantio”!

[Mendu vian diskon de Daphne:  
<[daphlawless@paradise.net.nz](mailto:daphlawless@paradise.net.nz)>]

[El *Arĝenta Filiko* septembro 2002]

**Okcidenta Aŭstralio: Honore al Christopher Dean:** Pluraj esperantistoj estis inter la ĉeestantoj ĉe la funebro-ceremonio por Christopher James William Dean, la 29an de julio; li mortis je la 19a.

Shirley Gradussov parolis pri la historio de liaj vivo (li naskiĝis la 15an de februaro 1914) kaj gastameco, plejparte en Esperanto; Alan Mendelawitz legis poezion; *Donu al mi vian manon*, *Amiko* estis kantita; kaj John Massam legis la *Patro-Nia-n* en Esperanto.

Aliaj esperantistoj kiuj ĉeestis inkluzivis René Smeets-on.

Parencoj venis el tre for por ĉeesti, kaj parolis varmkore pri li.

— Following the July committee meeting Education Officer Trish O'Connor negotiated with LOTE Teaching Aids (a company) and the Australian Esperanto Association regarding an article for the *Education Review*.

She wrote: "I am happy to report the following outcomes:

1) The editorial has been printed in the WA edition of *Education Review*. LOTE Teaching Aids paid for a quarter page advertisement, highlighting Esperanto. 1,800 distribution to schools and education departments.

2) The editorial has been printed in the NSW edition of *Education Review*. AEA are paying for a quarter

page summer school advertisement. 3,500 distribution to schools and education departments.

3) Unfortunately the magazine does not go to Victorian schools until 2003, but AEA will be able to promote future summer schools in the magazine.

Although we received very little response to our last editorial and Perth summer school advertisement, we have to continue educating the educators.

The *Education Review* is the perfect publication to do this.

N.B. The *Education Review* publication has changed its name to *Education Magazine*.

[El La nigra cigno aŭg.-sept. 2002]

---

## Mortis Ralph Harry kaj Brian Currie

Tuj forsendonte ĉi tiun numeron de *ENK* por presigo, ni informiĝis pri la morto lundon la 7an de oktobro de kaj Ralph Harry kaj Brian Currie. Nekrol-ogoj aperos en nia januara numero.

Pri Brian Currie via redaktoro mal-multon scias, krom ke li estis bone konata kaj tre aktiva esperantisto aŭstralia, kaj ĉefdelegito de UEA. Detaloj pri li devos atendi nian januaran numeron.

Pri Ralph Harry ni povas antaŭ-komenti ke:

Li esperantistiĝis dum li studis ĉe Universitato de Tasmanio en Hobarto. Li estis Rhodes Scholar kaj studis en Oksfordo. Li estis Ambasadoro de Aŭstralio en diversaj landoj, ankaŭ ĉe EEU en Bruselo; li poste fariĝis reprezentanto de Aŭstralio ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj estis membro de la komisiono por verki la *Deklaracion pri Homaj Rajtoj*. Dum kelka tempo li estis Direktoro de ASIO. Li ricevis honoran doktorecon de Universitato de Tasmanio.

Ralph fervore laboris por Esperanto. Li estis dum pluraj jaroj prezidanto de AEA, kaj verkis plurajn librojn en Esperanto. Ralph ofte verkis por *ENK*, kaj sub sia nomo kaj sub la ŝercnomo Diplodoko.

Mi ofte konversaciadis kun Ralph, ni multe interkorespondadis. Nepre li estis ne nur tre bona esperantisto sed ankaŭ tre kara amiko. — Donald Broadribb.

Brian Fox skribis al ni:

"I have just this minute heard that Ralph Harry has died, and that his funeral is today [10 October] at 4pm EST. I would very much appreciate if my personal condolences could be given to the family and to AEA, in addition to NZEA's condolences to family and AEA. I greatly valued Ralph's help in compiling the 4th edition of the Australian and New Zealand Esperanto Dictionary, and his permission for my name to appear with his as editors of what he had initiated back in 1983." □

# Konu viajn ĝesamideanojn

## Intervjuo kun Odlo Bokserp

*Ni ofte legas vian nomon, sed efektive ni scias malmulton pri vi. Ekzemple, kie kaj kiam vi naskiĝis? Kiuj estis viaj gepatroj?*

Facile respondeble. Mi naskiĝis en la jaro -551, en la sepa monato. La loko estis la vilaĝo Einen, en Ĉinio. (Ĝi nun estas parto de Bejĝingo, sed tiutempe estis tre malproksime en la kamparo.) Mia patro estis la lasta el la grandaj rokartistoj. Oni povas vidi kelkajn el liaj verkoj en la fama Rokgalerio ĉe Lascaux (en la nuna Francio); tre renoma estas lia Purpura Mamuto, unu el la ĉefpentraĵoj en la tuta historio de la mondo.

Mia patrino estis simpla skribistino el Libano, kie ŝi inventis la literon *m*, unu el la plej gravaj literoj en la tuta alfabeto. Ŝi ankaŭ helpis pri la invento de la litero *l*, sen kiu oni ja ne povus literumi mian propran nomon! Ŝi estis la 217a edzino de mia patro, kiu mortis en la jaro 5, do nelonge post mia naskiĝo.

*Kiel kaj kial via patro mortis?*

Efektive, la morto de mia patro estis tre tragedia. Verdire, li estis murdita. Oficiale, “ekzekutita” — li respondecis pri la pretigo de la kalendaro por la nova epoko. Li nomis la unuan jaron la Jaro Nul, ĉar tiel oni ja kalkulas, ĉu ne? -3, -2, -1, 0, +1, +2, +3 ktp.

La Imperiestro, Aŭgusto Cezaro, argumentis ke ĉar la araboj konigos la numeron nulo en Eŭropo nur post ĉ. 14 jarcentoj, kaj li volis jam nun

famiĝi pro sia kalendaro por la nova epoko, kaj ne post pli ol mil jaroj — nu, tiukiale, mia patro devos forigi el la nova kalendaro la jaron Nul kaj komenci ĝin per la tujtuja jaro Unu.

Ĉar mia patro rifuzis, Aŭgusto forviŝis lian nomon (Kalendisto) el la nova kalendaro, kio kaŭzis multajn problemojn, kaj importis serpenton el Egiptio por mordi lin kaj tiel mortigi lin.

Post sia tiama morto, mia patro longe malsanis, kaj poste li forveturis al Meksiko, kie li sukcesis enkonduki la numeron Nul, kiun oni nuntempe ofte malvidas en pluraj partoj de tiu lando.

*Jes, nu...Ŝajnas ke viaj gepatroj estis honestuloj, kiuj pergajnis sian panon sincere, se ne tre inteligente. Kio instigis vin adopti vian propran profesion?*

Hazarde, mi naskiĝis samjare kiel la tre konata verkisto Konfuceo, kaj dum nia kunlernado mi ofte helpis lin lerni kaj ekzerci la novan skribarton ĉinan. Mi tiam estis nur amatora fuŝisto, do mi nur kelkajn falsojn faris en liaj skribtaskoj. Tamen, instruisto vidis mian tre belaspektan desegnon de *nulo*, kaj proponis — ne tre afable — ke mi forfuĝu al Grekio. Kion mi volonte faris.

*Kial “volonte”?*

Nu, en la jaro -387, do dum mi estis ankoraŭ tre juna, mi sciigis ke greko nomita Platono fondas novan lernejon

en Ateno, kaj deziras grifelfuŝiston, kin liaj studentoj povos utiligi por malklarigi siajn skribitajn respondojn kiam ili ne certas kion skribi.

Tiel mi komencis mian profesian karieron kiel falsisto, pro kiu mi ricevos la Nobel-premion pri Fiziko en la jaro 2387, por festi la 2774-an datrevenon de tiu mia unua profesia laboraĵo.

*Vi estas bone konata kiel tre influa esperantisto. Kiam kaj kiel vi lernis Esperanton?*

Verdire, mi unue volis fariĝi profesia vokapukfuŝisto, sed ĉar mi estis tiutempe prabudhisto, Sacerdoto Schleyer rifuzis dungi min — li diris ke sendube mi fuŝos la malĝustajn vortojn.

Nelonge poste — en la jaro -938, laŭ mia memoro — L.L. Zamenhof mendis anoncojn en ĉiuj antikvaj antaŭgrekaj gazetoj, serĉante presfuŝiston por sia unua libro.

Unue mi ignoris la anoncon, ĉar mi opiniis min tro juna — mi ja naskiĝos nur post 381 jaroj! Sed iom poste, dum mi instruadis klason por Platono (kiu devis inverjui novan studenton nomitan Aristotelo), mi relegis la anoncon de L.L.Z., tuj antaŭlegonte lian unuan libron kaj mi tre forte aprobis ĝin. Estis klare al mi ke li multe bezonas presfuŝiston, kaj lia nova lingvo — kin li nomis *Esploranto* — grave helpos mian karieron.

Eble vi scias ke jam sur la titolpaĝo de lia libro mi sukcesis fuŝi lian nomon, “Doktoro Esploranto” — kion li ne rimarkis, ĉar tiutage liaj okulvitroj frakasigis kiam elektra tramo superveturis ilin. Nur post la dissendado de la libro li ekkonsciigis pri mia ago. Li devis rezigni sin al tiu faktaĵo, kaj ĉio post tio estas historio.

Sekvante tiun triumfon, mia kariero progresis senhalte kaj senŝalte.

*Je mi legis ke vian propran nomon viaj gepatroj intencis esti alia ol la nuna.*

Jes. Ili intencis nomi min Edlo Bokserp, laŭ mia prafilo, kies fama Ruĝa Dinosauŭro gajnis la unuan premion por rokarto en Paskinsulo, en la jaro -63998. Sed ili malklare skribis mian nomon sur la naskiĝatesto (ili uzis mian estontan fuŝitan grifelon), kaj la registristo legis la nomon kiel Odlo Bokserp. Min ofte ĝenas tiu eraro, ĉar ekzistas multaj odlobokserpoj en la mondo, ĉu ne?, sed mi estus la sola Edlo Bokserp.

*Vi diris ke viaj gepatroj estis famaj artistoj*

Ne, nur mia patro. Mia patrino estis grafikisto, ne konfuzu artiston kun grafikisto. Sed mia filo, la estonta Edlo Bokserp, naskiĝonta antaŭ 66000 jaroj, ja famas kiel superartisto.

*Negrave. Kion mi celis demandi estas: ĉu vi mem iam entreprenis artverkon?*

Jes ja. Mi intencas ricevi la premion Archibald jam ĉijare pro mia bildo pri nia amata Reaktoro:



El La gazeto

*Sed la Premio Archibald jam estis aljuĝita ĉijare.*

Nu jes, sed mi certas ricevonti ĝin.

*Fine, ĉu vi deziras montri al ni fotojn pri konkuraj portretoj ne ricevintaj la Premion Archibald?*

Certe. Unue, portreto de kato kaj muso kunmanĝantaj —



kaj due, portreto de elefantofeto en la utero de sia patrino:



Tamen laŭ mia opinio, ili tute ne similas al nia plejglora Reaktoro, do ne meritas la premion, kiun meritas la mia.

Fine, mi deziras rebati miajn kritikantojn, kiuj aŭdacis diri ke mia raporto en la antaŭa *ESK* estis falsita, kaj ke efektive mi nur feriadis en la Bermuda Triangulo, kaj tute ne partoprenis en internacia konferenco. Mi apenaŭ povas kredi ke tiel renoma sciencisto kia estas mi, pri kies veramo atestas ĉiuj spertaj redak

**LA AŬSTRALIA KAJ LA  
NOV-ZELANDA  
ESPERANTO-ASOCIOJ**

**Aŭstralia Esperanto-Asocio:**

**Prezidanto:** *Jennifer Bishop*, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.

☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806 (BH); 📠 03 9905 3668 (BH).

[esperanto@education.monash.edu.au](mailto:esperanto@education.monash.edu.au)

**Vicprezidantoj:**

*Franciska Toubale*, 1 Marne Rd, Mt Evelyn Vic 3796.

[franciska@bigpond.com](mailto:franciska@bigpond.com)

*Hazel Green*, 44 Toowoomba Rd, Oakey Qld 4401.

[hazgreen@twmba.net](mailto:hazgreen@twmba.net)

**Sekretario:** *John Gallagher*, 81 Lalla Road, Lillydale Tas 7268.

[abcetc@ozemail.com](mailto:abcetc@ozemail.com)

**Vicsekretario:** *Bob Felby*, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019.

☎ (08) 8242 1460.

[esperantobob@iprimus.com.au](mailto:esperantobob@iprimus.com.au)

**Kasisto:** *Stephen Pitney*, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

[Pitney@Cybernetint.net](mailto:Pitney@Cybernetint.net)

**Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:**

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

**Prezidanto:** *Bradley McDonald*, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

☎ 09 579 4767, 📠 09 579 6087.

[bradley@esperanto-lingvo.org](mailto:bradley@esperanto-lingvo.org)

**Sekretario:** *Howard Gravatt*, PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035.

☎ 09 626 6129.

[hgravatt@ihug.co.nz](mailto:hgravatt@ihug.co.nz)

**Kasisto:** *Jackie Fox*, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ 09-826 2081. [brianandjackie@abztrak.co.nz](mailto:brianandjackie@abztrak.co.nz)

**KOTIZOJ:**

**Aŭstralia Esperanto-Asocio:**

<http://www.esperanto.org.au/>

AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto de AEA: Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

**Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:**

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

**Unuopaj ekzempleroj de Esperanto sub la Suda Kruco:** Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la Libro-servo de AEA.

**Abonoj ekster Aŭstralazio:** €23,70; pagu al la konto aeal-w de la Libro-servo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

**Artikoloj de aŭtoroj nomitaj** estas © 2002 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas ©2002 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

**Ĉi tiu numero de EJK** estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac. La programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata per iMac, uzante Acrobat-on.

**Specialaj kunlaborantoj:**

*Odlo Bokserp*, I.N.K, K.R.A.J.O.N, K.R.E.T  
Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmistoj

*Vera Doloro*, L.M.K.

[lia multsuferanta kontrolanto]

Printed by Odlo Bokserp, 41 de la numero 2002 aperis en la kalendaro.